gardantoj kaj protektantoj de la tuta kultura sciado (kiu ja tiam nur buŝe estis transdonata) la druidoj pasigis preskaŭ duonon de sia vivo por lerni parkere epopeojn kaj leĝojn. Ili estis fakuloj pri kuracado de malsanoj kaj pro tio devis alproprigi al si vastan sciadkvanton pri plantoj kaj medicinaj herboj. Ili ankaŭ studis la multspecajn formojn de orakoloj kaj profetaĵoj, kaj devis koni la diversajn signosistemojn de sonĝ-interpretado kaj stelobservado.

Irlanda druido, kiu nomiĝis *Fingen*, onidire povis ekkoni la malsanon de iu persono laŭ la fumo elvenanta el la kameno de ties loĝejo. Jam tre frue oni antaŭpreparis infanojn por aliĝi al la druida ordeno. Druidoj estis juĝistoj, klerigis filojn de nobeloj, elektis la estron el la reĝa familio, kaj estis komandantoj dum batalo. Multege da laboro! Pri la "ora serpo" (por ni bone konata per la asteriksa Mirakulikso) jam Plinio la Maljuna (23-79 p.K.) raportis. Laŭ li certaj ceremonioj ĉe la keltoj okazis nur, kiam kreskis viskoj sur kverkoj. Tiam blanke vestitaj druidoj grimpis sur la arbon kaj fortranĉis la viskaĵon per ora falĉileto – cele de "enkorpiĝo de la kverka spirito".

La historiisto *Titus Calpurnius Siculus*, kiu estis vivanta en la unua jarcento p.K. (sed nur rezerve fidinda) raportas, ke la druidoj mortigis virojn per tranĉilpiko supren de la diafragmo kaj profete orakolis laŭ la viktimaj konvulsioj kaj sangofluo. La intertempe trovitaj marĉkadavroj ja ŝajne konfirmas la fakton de tiamaj homviktimoj kiel oferaĵoj por iuj keltaj dioj. Sed tiutempe temis por la romianoj ne pri humaneco sed pri politiko: en la jaro 54 p.K. la kelta kredo en Britujo estis malpermesata kaj sep jarojn poste kruele ekstermita. (2003-11-20) – *sa*

## Breda malpermeso!

Certe oni povas produkti el la pekinhundeta raso malgrandan batal-maŝinon, same kiel oni povas eduki batalhundojn, konformigi kun sia (homa) medio kaj ne mordi ĉion, kio moviĝas. Ĉu la agresemo de bulte-riero estas alproprigita per edukado aŭ heredigita per la genoj, pri tio kverelas inter si la hundoposedantoj kaj la potencialaj viktimoj. Ĉiuoka-ze estas pruvite, ke hunda agresemo estas bredebla – bedaŭrinde ne ĉiam bridebla. Sed krom la hereda aŭ eduke alproprigita agresemo cer-taj hundorasoj ja posedas pliajn fontojn de danĝero, nome genetike fik-sitajn ecojn kiel ekz. fortoplenan staturon kaj mordfortecon. Nu, tio – spite de bred- kaj edukadebloj – ja bonŝance kaŭzas certajn limojn ĉe nanaj pudeloj kaj malgrandaj pekinhundetoj kiel batalmaŝinoj…

(Fonto: *Kaltenbach* 2002-05-21)



# Scienca Revuo Vol. 55 (2004)(3) / n-ro 198

*Oficiala organo de Internacia Scienca Asocio Esperantista (ISAE)*

**Pres-indikaĵoj** : ISSN 0048-9557, Eldonanto: ISAE
Laserkopiita : Septembro 2004 ĉe *Copy & Co, Eschwege*/Germanio
Responsa redakta teamo : La estraro de ISAE

**Membrokotizo de ISAE : € 20.00/jare**
pagebla al
a) **landa peranto** (resp. landa delegito), aŭ al
b) ISAE-konto **ĉe UEA** / *Rotterdam* (NL): **isae-z,** aŭ al
c) **Poŝtbanka konto** n-ro 140 380-608 nome de ISAE-SACHS
ĉe *Postbank Frankfurt/Main*, Germanio, Banka kodo 500 100 60

IBAN: DE76 5001 0060 0140 3806 08
BIC: PBNKDEFF

## Landaj Perantoj de ISAE

| | |
|---|---|
| Aŭstralio | *Libroservo AEA <Libroservo@ans.com.au>*<br>*143, Lawson St., Redfern, AU 2016 N.S.W.* |
| Brazilo | *Brazila Esperanto Ligo (BEL) < bel@esperanto.org.br>*<br>*C.P. 03625 BEL BR 70084-970 Brasilia* |
| Britio | *S-ro Paul Hewitt <paul@esperanto.freeserve.co.uk>*<br>*26, Highfield Rd., North Thoresby*<br>*Grimsby, N.E. Links, GB – DN36 5RT* |
| Finnlando | *S-ino Heta Kesälä <heta.kesala@pp.inet.fi>*<br>*Kalamihenkuya 3 D 32, FI-4300 Tuusula* |
| Francio | *S-ro Charles Trébouet <trebouet.bohere@compagnet.fr>*<br>*Ferme de Monchy, FR-60390 Auneuil* |
| Irlando | *S-ino Joy Davies <noviresp@eircom.net>*<br>*9, Templeogue Wood, IE-Dublin 6W* |
| Korea Resp. | *S-ro Cho Sung Ho <shcho@inha.ac.kr>*<br>*Biol.Fak.Inha Univ., KR Inchon 402-751* |
| Norvegio | *Eldonejo Esperanto <hara-ryg@online.no>*<br>*Olaf Schous vei 18, NO-0572 Oslo* |
| Pollando | *S-ino Maria Majerczak*<br>*ul. Armii Krajowej 7 m 122, PL - 30 150 Kraków* |
| Svedio | *S-ino Lisbeth Andreasson <bertil.andreasson@horby.mail.telia.com>*<br>*Södra Rörum pl. 455, SE 24294 Hörby* |
| Usono | *Esperanto-Ligo de Norda Ameriko (ELNA) <elna@esperanto-us.org>*<br>*P.O.Box 1129, El Cerrito CA 94530, USA* |

**Nepre informu pri via membrokotizpago laŭ b) aŭ c) la eldonanton kun indiko de la kompleta poŝtadreso al kiu estu sendota Scienca Revuo:**
***Prof Dr R Sachs, Vor dem Brückentor 3, DE-37269-Eschwege/Germanio***
***Tel./Fakso xx49-(0)5651-331866; <IsaeSachs@aol.com>***